

I. F. E. A.  
ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIARI ESPERANTISTI

Aderente: alla INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO FEDERACIO "I.F.E.F."; alla UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO "U.E.A."; e alla ITALA ESPERANTO-FEDERACIO F.E.I. (Ente Morale D.P.R. 28-6-1956 n° 1720).  
Sede Centrale: DOPOLAVORO FERROVIARIO- BOLOGNA

I N F O R M A B U L T E N O = I T A L A F E R V O J I S T O

Redazione: Via Donato Creti, 61 BOLOGNA (Italia)

N° 9 - 10

Septembro kaj oktobro 1963-a

13-a Jaro

C O M U N I C A T O

Col Congresso Nazionale della "Itala Fervojoista Esperanto-Asocio" tenute-si, il 15 settembre 1963 a Saint Vincent, nel quadro del 34° Congresso Nazionale di Esperanto, si è aperte il nuovo anno finanziario 1963-1964.

Preghiamo vivamente i nostri Soci di versare le quote al più presto. Per agevolare il versamento delle quote sociali si allega al presente bollettino, il bollettino di versamento nel Conto Corrente Postale n° 8/24094 intestato alla: "Itala Fervojoista Esperanto-Asocio" Via Donato Creti, 61 Bologna (131).

In conseguenza delle decisioni prese durante il Congresso di Saint Vincent, le quote sociali per l'anno 1963-1964 sono le seguenti:  
-Associazione all'I.F.E.A.-all'I.F.E.F.-alla U.E.A. ed alla F.E.I., con abbonamento alla rivista "L'Esperanto": £. 1800,- annue.

-Associazione solamente all'I.F.E.A. ed all'I.F.E.F. (per quei Soci che pagano le quote di associazione alla F.E.I. ed all'U.E.A. direttamente o tramite i Gruppi Esperantisti locali): £. 800,- annue.

Si pregano vivamente i Soci che non hanno ancora pagate le quote sociali per l'anno 1963, e che continuano a ricevere il bollettino, di trasmettere con ogni urgenza le quote 1963 che noi già abbiamo versate alle Associazioni di cui siamo aderenti (IFEPA-UEA e FEI) oppure trasmettere le loro dimissioni per non costringerci a pagare le loro quote anche per l'anno 1964 alle suddette Associazioni.

16-a INTERNACIA FERVOJISTA KONGRESO

Bruselo (Belgio) de la 9-a ĝis la 15-a de majo 1963-a

Korespondadrese: Centra Stacio, Bruselo 1, Belgio - Poŝtĉekkonto: 4770.76  
Bankkonto: Kredietbank Bruselo N° 357/13/10470 - Telefono: Bruselo (02) 568332  
Kongresketizo: ĝis 31-12-1963: 200 F - ĝis 31-3-1964: 300 F.

Poste: 350 F. Familianoj, pensiuloj kaj junuloj malpli ol 25 jaraĝaj ĝuos rabaton de 50 %. Simpatiantoj: 50 F.

Loĝado: Ĉiu kongresano estos loĝigata je maksimume 15 minuta distanco de la kongresejo. Loĝkategorioj: A) Hotelo 250 F. B) Hotelo 200 F. C) Hotelo 150 F. D) Hotelo 100 F. E) Amasloĝejo 50 F. En ĉiuj prezoj estas enkalkulita la transporto, matenmanĝo, takso kaj ankaŭ la servmono.

Per la postkongresa restado en Amsterdam de la 16-a ĝis la 19-a de majo, formiĝis malgranda komitato, konsistanta el la kolegoj: K.G.J.de Jong, prezidante, H. Heen, sekretario, E. Oosterwijk, kasisto, W.L.van Leuwen, ekskursoj, J. Lok, loĝado. Korespondadrese: H.Hoen, von Liebigweg 7, Amsterdam.

Definitiva plano ankoraŭ ne ekzistas. La komitato planas ekskursojn en la preksimeco de Amsterdamo (florkampoj, tipaj fiŝistaj lokoj, strando) kaj en la orienta parto de la lando, eventuale kun komunaj manĝoj. Mardon la 19-an de majo estas libera posttagmezo. Intertraktoj kun la komunuma estraro pri malmultekosta amasloĝejo jam komenciĝis. En sekvonta kongreskomuniko aperos pli detalaj informoj pri ekskursoj, restado, kostoj kaj bezonata vojaĝbileto.

ELEZIONE DEL RAPPRESENTANTE DELL'I.F.E.A. NEL COMITATO

PERMANENTE DELL' I.F.E.F.

A seguite dell'annuncio di cui al numero precedente, n°34 Seci hanno partecipate alla elezione del rappresentante dell'Associazione Italiana Ferrovieri Esperantisti nel future Comitato permanente della Federazione Internazionale Ferrovieri Esperantisti "I.F.E.F.". Ecce i risultati di tale votazione: Votanti n° 34. Hanne ottenute voti:

- Gimelli p.i. Germano di Bologna, voti n° 31
- Corradi Celso di Genova Sampierdarena, voti n° 1
- Catena Giulio di Bologna, voti n° 1
- Leonardi Melchioro di Bologna, voti n° 1

Pertante il Sig. Gimelli p.i. Germano di Bologna è risultate eletto.

49-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

DEN HAAG - Nederlando - 1-8 aùguste 1964

SUB LA ALTA PROTEKTADO DE ŠIA MOŠTO JULIANA, REĜINO DE NEDERLANDO.

La lande de la multkoloraj floroj atendas vin! Ĝuu la gastemecon de la nederlanda popolo partoprenante en la 49- Universala Kongreso de Esperanto. Konstanta Adreso: U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

PROVIZORA PROGRAMO

La 49-a Universala Kongreso de Esperanto komenciĝos sabaton la 1-an de aùguste kaj fermiĝos sabaton la 8-an de aùguste. La kongresaj ĝiĉetoj estas malfermitaj kaj funkcies jam vendredon la 31-an de julie.

I.-Manifestacio antaù la Kongreso: 20-a Internacia Junulara Kongreso de T.E.J.O. Amsterdam (En "Anne Frank-Domo")

II.-Kongresaj Laborej: Ĝeneralaj kunvenoj de U.E.A.-Fakaj kunvenoj-Komitato de U.E.A.-Estrare de U.E.A.-Akademie de Esperanto.

III.-Kultura kaj arta programoj: Teatraj prezentadoj-Internacia Somera Universitato-Belarta konkurso kaj nomado de la "Aùtero de la jare"-Oratora Konkurso.

IV.-Festoj: Interkona Vespere-Solena Inaùguro-Filmprezentadoj-Kongresa Ballo-Bankedo-Junulara Vespere-Ekskursoj-Solena Ferme. Ekskursoj okazos i. a. al Amsterdam, al Rotterdam, al la regiono de la novaj polderej (sekigita Suda Maro), al la Delto-verkoj (projektitaj post la akvokatastrofo de 1953) ktp. Multaj famaj, pentrindaj kaj interesaj lokoj estas vizitataj.

V.-34-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj

VI.-9-a Internacia Infana Kongreseto

VII.-Arango post la Kongreso: Trilanda Postkongresa Arango en Leeuwarden (provinco Frislando)

ĜENERALAJ INFORMOJ

Korespondado: La oficiala lingvo de la 49-a U.K. estas Esperanto. En ĉiu korespondado la skribanto devas citi sian kongresan numeron kaj aldoni irk.

Konstanta adreso: ĉe U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando

Aliĝiloj: La kongresano sendu la koncernajn aliĝilon/mendilon kune kun la pago al la sama instance. Kiel pagi: 1. Pere de la Oficialaj Perantej de la Kongreso. 2. Rekte al la Centra Oficejo de U.E.A. (Banko: Mees & Zoonen aù Postĉekkonto: 378964 je la nomo de U.E.A.)

Kotize: La kotize inkluzivas la tutan programon de la Kongreso, escepte de la ekskursoj, kaj la rajton utiligi la Loĝigan Servon de la Kongreso. La kotizo devas esti antaùpagita. Ĝi estas prepraĵo de la Kongreso, eĉ se la paginto ne partoprenos en ĝi.

Rabatoj: Plenaĝaj aliĝintoj, kiuj estas Individuaj Membroj de U.E.A. (t.e. ricevas minimume la Jarlibron) rajtas rabaton de 5 ned.gul. (20 steloj).

Edz(in)o de membre rajtas rabaton de duono de tiu sumo. La rabato ne validas por aliaj familianoj, studentoj, blinduloj kaj kiu ajn alia kategorio.

VERSATE IMMEDIATAMENTE LE QUOTE SOCIALI = ADERITE ALL'I.F.E.A.

13-a NACIA KONGRESO DE ITALA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO (I.F.E.A.)  
SAINT VINCENT-Aosta Valo - la 15-an de Septembro 1963-a

En la kadro de la 34-a Itala Nacia Kongreso de Esperanto, la 15-an de septembro je la 19-a horo en la salono de la Kongresa Centro en Granda Hotelo Billia de S. Vincent, okazis la Jarkunveno de I.F.E.A.

Malfermis la kunsidon, per enkondukaj vortoj, la Prezidanto Kav. Zacconi. Poste la eksterlandaj ĉeestantoj estis petataj sidi ĉe la prezida tablo kaj saluti la kunvenon. Unue, kiel virino, parolis F-ino Prigent el Parizo, kiu jam alifoje partoprenis niajn kunvenojn. S-ro Teufelsbrucker el Linz (Aŭstrio) salutis kaj bondeziris la kunvenon en la nomo de aŭstria kolegoj. Poste S-ro Demalliens el Houilles (Francio) prezentis la salutojn de la francaj kolegoj kaj donis sugestojn por disvastigo kaj propagando de nia movado en fervojista tereno. La kara amiko Sasselli el Arbedo (Svislando) donis la varmajn bondezirojn kaj salutojn de niaj frataj Ticinaj kaj Svislandaj kolegoj. La sekretario Gimelli raportis pri la agado de la Asocio kaj pri la 15-a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso en Stoke-on-Trent (Britujo), kie oni decidis la starigon de Konstanta Komitato de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio "I.F.E.F." kie devas esti reprezentata ĉiu landa asocio. Pro tio estis necese baloti por elekti landan reprezentanton. La ĉeestantoj voĉdonis, kiel italan reprezentanton, S-ron Gimelli p.i. Germano el Bologna. Oni anoncis ke venonta Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso (16-a IFEF-Kongreso) okazos en Bruselo (Belgujo) de la 9-a ĝis la 15-a de majo 1964-a kun tre alloga programo.

La sekretario, ankaŭ en la nomo de kasisto S-ro Catena, klarigis mallonge la bilancon de nia Asocio pri la jaro 1962-1963, kiu estas tute kontentiga. La Prezidanto, fine, resumis la laboron faritan kaj planis tiun farotan por la plibonigo de la Asocio, por plivastigo de la Esperanto-Movado inter la fervojistoj, kaj disvastigo kaj kono de Esperanto en fervojista medio.

EDWARD M. ROSHER - VERKISTO DE LA FERVOJA TERMINARO

En la lasta numero de "Jen", Bulteno de la Brita Asocio de Esperantistoj Fervojistoj, ni legis la jenan artikolon de nia kara amiko Horace BARKS: Sinjoro Edward M. Rosher, M. Inst. C.E.

"S-ro Rosher, la verkisto de la Brita Esperanta Fervoj-Terminaro, estas nun 87-jaraĝa junulo, ankoraŭ aktiva pri Esperanto. Kiu estas ĉi tiu entuziasmo? Mi ne scias kie precize li naskiĝis, sed mi supozas ie en la suda parto de Anglujo. Mi scias ke kiam li estis nur dudek-jarulo li iris al Sud Afriko por tie sekvi sian profesion kiel inĝeniero. Li estis tie Inĝeniere de distrikto de la Cape to Cairo (Kapo de Bonespero al Kajro) Fervojo kaj estis respondeca per la esplorado, konstruado, kaj mantenido de pli ol 1000 mejloj de la fervoje. Tie li laboris ĝis 1907-a.

De 1908-a li estis Ĉef-Inĝeniere de la Fervoje Centrala de Kube. Dum en tiu posteno li konstruis multe da novaj linioj. Li forlasis Kubon kiam eksplodis la unua mondmilito, kaj hejmenveninte, soldatiĝis.

Dum lia milit-servado li estis Ĉef-Inĝeniere de la Bagdad Okcidenta Fervoje, kaj rekonstruis la detruitajn fervojon, kaj konstruis novajn liniojn. Dum tiu ĉi periodo, li iamaniere, mirakle, trovis la tempon lerni Esperanton. (Bedaŭrinde multaj kiuj ne estas eĉ duone tiom superŝutataj de taskoj deziras, sed ne havas tempon lerni la lingvon. Komprenoble nur la tre okupata persono povas trovi tempon por ien fari).

Post la milito S-ro Rosher esploris kaj raportis pri la Trans-Siberia Fervoje. En Siberio, Sinjoro Rosher uzis la ŝatatan internacian lingvon, kaj de tiam komencis sian grandan laboron por la Fervoj-Terminaro.

En la jaro 1920 li migris al Kalifornio, kie li ricevis sian unuan pestene pere de Esperanto.

Li skribas ke li ĝojas ke la IFEF-Terminara Komitato decidis eldoni provi zoran terminaron, ĉar li diras "half a loaf is bitter than no bread" (angla diraĵo kiu signifas ke duono de panbulo estas pli bona ol nenio).

Mi esprimas al tiu ĉi heroo de nia movado, la dankojn de ĉiuj Esperantistoj, fervojistaj kaj ne-fervojistaj, junaj kaj ne tiel junaj.

Rezolucio: mi devos inspekti la Trans-Siberian Fervojon en 1965-a. Kompreneble survoje al la unua mondkongreso en Azio. Kiu volas akompani min? Mi definite proponas iri, kaj kiam mi estos sur la Trans-Siberio, mi multe pripensos Sinjoron Edward M. Rosher.

Horace BARKS

#### NOVA DISTINGO AL HUGO STEINER

GRANDA HONORINSIGNO PRO MERITOJ PRI LA AUSTRIA LIGLANDO "MALSUPRA AUSTRIO"

La fondinto kaj direktore de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno Korte-ga Konsilisto H. Steiner, ricevis de la Landa Registaro de Malsupra Aŭstrio la Grandan Honorinsignon kua koncerna dekreto pro merito. Ĉi estis donata de la Landestre D-ro Dip.Inĝ. Leopold Figl, iama Prezidanto de Aŭstria Parlamente kaj Kanceliere, kiu per belaj vortoj dankis K.K. Steiner kiu pere de la Internacia Lingve Esperanto faris tiajn servojn.

Ni fervojistoj-esperantistoj korege sendas la plej sindonajn gratulejn al nia malnova pioniro kiu elstaras en nia mezo kiel Honora Prezidanto de Aŭstria Fervojistoj-Esperantistoj kaj simpatia partoprenante al niaj Kongresoj kaj manifestacioj.

#### ORATORA KONKURSO EN SAINT VINCENT

Okaze de la 34-a Nacia Kongreso de Esperanto, Itala Esperanto Federacio kaj Esperantista Junularo aranĝis Oratoran Konkurson.

La juĝkomisiono konsistis el reprezentantoj de: Regiona Asesorato por Publika Instruado, Itala Esperanto Federacio, Itala Esperantista Junularo, Itala Esperanto Instituto kaj Itala Ligo Esperantistaj Instruistoj.

Temoj de la Konkurso estis: a) Gejunuloj kaj Eŭropo, b) Kiajn avantaĝojn pevas ricevi gejunuloj de Esperanto, c) Elstara persono en la itala literaturo, d) Gejunuloj kaj libera tempe, e) Kampanjo kontraŭ malsate en la mondo.

Ses kandidatoj partoprenis tiun interesan novstarigitan konkurson. La ĝenerala nivelo estis alta, kaj la multnombra ĉeestantaro kelkfoje interrompis la oratorajejn per aplaŭdoj.

Unuan premian gajnis nia juna membro Antonio De Salvo kiu per klara kaj bone prezentita parolado ilustris brile la temon "Gejunuloj kaj libera tempo". La dua kaj tria premioj estis atribuitaj al Giuliano Turone el Milano kaj Carlo Valli el Torino. Konsola premio venis al F-ine Teresa Casagrande el Bologna kiu parolis pri "Kampanjo kontraŭ malsate en la mondo".

#### EĤO DE 48-a UNIVERSALA KONGRESO

La itala semajna ilustrita revuo "DOMENICA DEL CORRIERE" publikigis dupaĝan artikolon kun fotoj kaj specimeno de paĝo de la "Dia Komedio" de Dante Alighieri tradukita en Esperanto de Prof-ro G. Peterlongo prezentante, vide al vide, la italan kaj esperantan tekston.

La artikolo verkita de Vitterio Dall'Acqua el Milano kiel voĉo de unu el la 3500 esperantistoj ĉeestintaj la kongreson en Sefio, estis titolita "Ni estis el 45 landoj kaj oni komprenis unu la alian sen interpretiste". La verkiste diras: Mi travivis neforgeseblan sperton. Gento neniam antaŭvidita, ŝaninis ĉiam vivanta kune. Kiel O.N.U. ne decidis ke ĉiuj popoloj de la mondo parolu, kiel ni, unu solan lingvon? Oni multe parolis pri kompleta akordo kiu finfine alportu paco al ĉiuj popoloj de la terglobo. Bone, sed kiel tiuj popoloj povas interkompreniĝi? Per kiu lingvo? Oni devos, elekti unu lingvon? Sed en tiu kazo oni ne frapos la landajn ofendiĝemojn? Kial ne pruvi per Esperanto? Esperanto estas lingvo per ĉiuj kaj apartenas al neniu aparta Lande, tial estus perfekta internacia lingvo. Se Esperanto estus lernata en ĉiuj lernejoj de la mondo, kiel dua lingvo flanke de la nacia, neniu sentus sin

kiel fremdulo. Ĉie oni sentus sin hejme.

DIA KOMEDIO DE DANTE - ITALA-ESPERANTA ELDONO

Dum la S. Vincent-Kongreso aperis, sur la librovendeja tablo, la dulingva (itala-esperanta) eldono de la "DIA KOMEDIO" de Dante Alighieri, en la traduko de G. Peterlongo. Tiu estis ankaŭ la sensacio de la Kongreso en Sefio: la novan monumentan 710-paĝan verkon, ilustras 94 desegnaĵoj de Sandro Botticelli. Per ke la volumo, ĵus elirinta el la presejo, atingu la Sefian Kongreson ĝustatempe, la itala karavano kunprenis kaj veturigis ĝin tra ĉiuj landlimoj.

La traduko estis reviziata dum dek jaroj de pluraj konataj esperantistoj, inter kiuj nia elstara membro D-ro Inĝ. Giordano Azzi, D-re E.Dendi, Kav. Minnaja kaj Prof-ino Centerne.

La dulingva eldono estas zorgata de la Milana eldonejo "S.I.E.I." kun mecenata subteno de la file de la tradukinto D-ro Inĝ. Paolo Peterlongo.

Pro sia luksa aspekto, la volumo verŝajne post kelkaj jaroj fariĝos valoraĵo en la antikvista artmerkato.

Dum la 48-a U.K. en Sefio okazis ankaŭ prelego pri Dante, al kiu partoprenis pli ol 150 personoj, pri la temo: "Nekonataj belaĵoj de la Dia Komedio". La tekston de Prof-ino Centerne legis Carlo Minnaja.

LA ENCIKLIKO DE PAPO JOHANO XXIII-a, "PACEM IN TERRIS" EN ESPERANTO

La Surtera Pace - "Pacem in Terris" prezentas la Dian vorton pere de la neforgesebla nia Sankta Patro Johano XXIII-a, kiu, grandega en sia humile vekis ĉe la tuta mondo de kredantoj kaj nekredantoj la vivantan bildon de Jesuo, kiu patre alvokas al si la filejn.

La encikliko de Pape Johano XXIII-a titolita "Pacem in Terris" estas esperante tradukita kaj broŝure presita fare de la Internacia Katelika Unuiĝo Esperantista "I.K.U.E." kaj estas bonvenita kiel grava iniciato en la esperanta presaro.

"CORRIERE NUOVA EUROPA"

La numero de septembro-oktobro 1963 de la monata revuo "Corriere Nuova Europa" Corso A. Pedestà, 10/B Geneva, publikigis tutpaĝan artikolon en Esperanto titolitan "Per Eŭropo vere unuigita". La verkisto, Prof-ro Aldo Schmucker el Geneva, kiu estas inter la kulturaj kunlaborantoj de la revuo, memoras inter alie la anstataŭigo de bedaŭrata Prof.D-ro Giorgio Canute kiel Prezidanto de U.E.A., per Prof.D-ro Hideo Jagi, glora membro de la Universitato de Tokio.

PROSPEKTO DE BARCELONO

"Barcelono-Grafa Urbo" nomiĝas la plurkolora faldfolio en Esperanto kun fotoj kaj historio de la Grafa Urbo, senpage havebla per: Hispana Esperanto-Instituto, Str. Montcada, 12 poŝtkesto 1073 Barcelono-3 (Hispanio). "T A M E N" - Organo de Pola Esperanto-Junularo kaj Unuiĝo de Polaj Studetoj.

Ni ricevis ekzempleron de "Tamen" - Organo de Pola Esperanto-Junularo. Tiu interesa kaj vigla revuo estas abone havebla ĉe: Eksperta kaj Importa Entrepreno Ruch, Varsovie, Str. Wileza, 46 Pollando, aŭ al ĝiaj reprezentanto en nia lando, kiu estas: Sante Varasca Via M. Macchi, 71 Milano (Italujo). La adrese de tiu riĉenhava revuo estas: Redakcio de "Tamen" Str. Dubois, 3 WROCLAW (Pollando).

GRANDA MORAVIO

Estas la titolo de la 12-paĝa broŝuro kun multaj fotoj, eldonita en Esperanto de la Parko de Kulturo kaj Ripozo en Brno, en kunlabore kun Esperantista Klubo en Brno, per memori la 1100-an Jubileon de alveno de la Bizanca Misio, fratej Kostantino, Cirilo kaj Metodio en Moravien.

DEZIRAS KORESPONDI: J.V. HAERING, Nad král. oborù, 43 PRAHA VII/7, Ĉeĥoslovakio; deziras korespondi pri ĉiuj temoj kaj interŝanĝi I.P.K. - P.M. kaj almetetikedejn. Responde certa.

VINTRA FERIASEMAJNO EN AŬSTRIO

Loko: Edlach, apud Payerbach-Reichenau, Aŭstrio.

Tempo: De la 26-a de decembro 1963-a ĝis la 1-a de januaro 1964-a.

Kotizeoj: Anoncej ĝis 10-12-1963 n.gld.60, junuloj (ĝis 21-jaroj) n.gld.50, post la 10-12-1963, 10 n.gld. pli.-Pagojn kaj anoncejn nepre sendu al: Aŭstria Esperanto-Federacio, organiza komitato, Wien 15, Funfhausgasse 16. Ĉekkonto: Creditanstalt Bankverein ELT 2137. Indiku: Vintra feriosema.

LA PROGRAMO: Ĵaŭdo, 26-12-63: Alveno de la partoprenantoj en Edlach.

Vendredo, 27-12-63: Akceptado per la ferioĝvidanto. Vizito de la ĉirkaŭaĵo.

Sabato, 28-12-63: Veturado sur "Schneeberg (neĝo-monto) per dentrada fervojo (1795 metrojn alten). Skiadeblecoj.

Dimanĉo, 29-12-63: Vizite de Vieno per aŭtobusoj. Tuttaga ekskurso. Renkontiĝo kun tieaj gesamideanoj. Vizite de la "Trezorejoj".

Lundo, 30-12-63: Libera tago. Konkursoj.

Mardo, 31-12-63: Fino de la skikonkurso. Disdono de la premioj. Adiaŭa gaja vespero.

Merkredo, 1-1-1964: Forveture de la partoprenintoj.

Ripezado: En la bonega aere de la alpa regiono vi kolektos novajn fortejn per la venonta sezono. Belaj promenvejoj vin atendas. Montoj pli ol 2000 metroj altaj ĉirkaŭos vin.

Spertado: Tre proksimaj skiterenoj. Je via dispone estas apuda kablefervojo. La mentara sunradiado vin baldaŭ brunigos. Sur glitveturilo vi povas trarapidi la ĉirkaŭaĵon de Edlach.

Partoprenu la postsemajnajn tagejn en Vieno de la 1-a ĝis la 4-a de januaro 1964-a. Kompleta aranĝo kun tranektaĵoj kaj ĉiuj manĝaĵoj: nur 3 sil.450.

ESPERANTO EN AZIO

En Azio la Esperanto-movado estas ankoraŭ en komenca periodo, sed laŭ la dua baza laborplano oni disponigas konvenan, taŭgan kaj novan breŝuren:

BAHASA ESPERANTO, AZAS, PERKEMBANGAN DAN KEMADJUANJA

(Esperanto, ĝia strukturo, evoluo kaj progresado)

Ĉar la libre estas per uzado de ne-Esperantistoj, ĝi estas en Indonezia lingvo, sed la libre enhavas apartan instigan artikelon: Naŭ tezoj pri la Azio-Afrika lingvoproblemo, kaj tiu ĉi konvinkiga artikelo estas en 4 lingvoj: Esperanto, Indonezia, Ĉina kaj Angla. Mendu ĉi tiun libreton (formate 16x12 cm. 32 paĝoj) kaj plue donacu ĝin al viaj amikoj en Azio-Afriko. La prezo estas bagatelo: 2 internaciaj respondkuponoj plus 1 resp.kup. per registrita sendo. Skribu baldaŭ al: "INDONEZIA ESPERANTISTO" Liem Tjong Hie, Dj.Gadjah Mada 60 SEMARANG (Indonezio).

ESPERANTO EN LA RADIO

RADIO ROMA - ESPERANTO-FAKO: Casella Postale 320 R O M A (Italujo)

La dissendoj okazas de la 18,55 h. ĝis la 19,10 h. (M.E.T.).

Ondlongoj: metroj 30,90=Mc/s.9,71; metroj 41,24=Mc/s.7,27; metroj 50,34=5,96

Prelegantoj: mardo kaj merkredo: S-re Luigi MINNAJA - Vendredo: Prof.D-re Vincenzo MUSELLA. - Ĉiujn merkredojn: Kuriero de Esperanto.

DISSENDOJ EN ESPERANTO, JARO 1963-a - DECEMBRO 1963-a: mardon la 3-an: Tra la literaturo - vendredon la 6-an: Fiŝkaptado en Apulio - mardon la 10-an: Novaĵoj el Italujo - vendredon la 13-an: Nevele de Di Giacomo: "Ĉu vi velas la kiseton?" - mardon la 17-an: Italaj kanzonoj en Esperanto - vendredon la 20-an: Kiel ni malakrigu la Kristnaskan frosten? - mardon la 24-an: Leterkeste - vendredon la 27-an: Italujo kaj fremdaj verkistoj: Lord Byron - mardon la 31-an: Metaponto kaj ĝiaj temploj.

La Fakestro: L. Minnaja